

74-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO - BADAJOZ 2018
74° CONGRESO INTERNACIONAL DE JÓVENES ESPERANTISTAS - BADAJOZ 2018

Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo	Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo
#MiaSekretaAmiko: feminismaj brazilaj kampanjoj kiuj evidentigis la ĉiutagajn masklismajn kutimojn	Parolo pri kradvortoj kiuj furoris en la reto kaj kiuj poste estis la bazo por kreado de libroj. La ĉefa celo estas pridiskuti kiel la debato pri feminismaj temoj povas transiri la retan mondon kaj vere ŝangi aferojn en niaj socioj.	Karina	Aikido	Praktiku aikidon kun Veliga!	Veliga
Akvobatalo	Kiu ne ŝatas iom da akvo dum varma tago? Ni luktos kontraŭ la suno per akvo. En la korto ni povos persekuti la aliajn por malsekigi ilin sed sendube, ankaŭ malsekiĝos!	Skoltoj	Aligatorejo	Aligatorejo estas ideala ŝanco por ekzerci viajn kapablojn en fremdaj lingvoj. Venu kaj ekparolu kun denaskuloj aŭ aliaj homoj kiuj lernas la saman lingvon kiel vi!	Paulína
Asambleo de HEJS	Asambleo de la Hispana landa sekcio de TEJO por renovigi sian estraron	Carlos	Asocioj kaj egaleco	Ni invitis asociojn el Ekstremaduro kiuj laboras pri la temo de genra egaleco por ke ili rakontos kion ili faras. Ni kunparolu por kompari la situaciojn en diversaj landoj kaj kulturoj, por lerni per ilia agado.	Projekto FEJ
Astronomia promenado	La pozicio de la kongresejo, for de la urbocentro, faciligas spekti la steloj nokte. Tial nokte ni promemos sub la ĉielo por ke vi ĝuu kaj lernu pri konstelacioj kaj aliaj astronomiaj aferoj.	Ari	Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI)	Karavano bicikla okazis por atingi la IJK 2018. En tiu ĉi prelego vi povos aŭskulti la aventurojn el la homoj kiu trairis Eŭropon por esperantumi. Tiuj ĉi "pigruloj" sidis dum pli ol 3.000!	Lars
Ĉu ja juneco ekzistas?	Ĉu ja juneco ekzistas? Juneco... ja... Supozeble ĉiuj sopiras al ĝi... Tamen kio fakte estas ĝi? Kiom da freŝeco ekzistas en ĉi tiu vorto: juneco? Tamen kiom da antaŭjuĝo ankaŭ ekzistas en ĝi? Kaj ĉu ja juneco ekzistas?	Joao	Dio de militeco - La falo de Olimpio	Post la granda batalo inter la dio kaj la titanoj, Zeus kaj liaj fratoj regiĝis sur la homaro, sed ekzistas novan senton en Grekio ke tio tute ne daŭreblos... Vidu la filemton por ĝoji rakonton de unu de la plej famaj Playstation® videoludoj	Taled
Drakoj kaj Galerioj	Amitai gvidos ludon de la konata rolludo Drakoj kaj Galerioj. Venu por kunvojaĝi tra subteraj koridoroj, trovi trezorojn, venki banditojn kaj travivi aventurojn.	Amitai	Edukaj projektoj en TEJO		Charlotte
Ekstremaduraj birdoj	Matena ekskurso por trovi kaj vidi la birdojn kiuj profitas de la rivera naturo apud Badajoz. Akompanu Kani-n por lerni kaj ĝui la diverseco de bestoj apud nia kongresejo.	Kani	Eldonejo Impeto	Eldonejo "Impeto" (http://impeto.trovu.com) jam la 26-an jaron seninterrompe aperigas librojn en kaj pri Esperanto. Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova rakontos iom pri la agado de eldonejo, prezentos novajn librojn kaj malkovros la planojn de eldonagado de eldonejo por la proksima tempo.	Dima

74-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO - BADAJOZ 2018
74° CONGRESO INTERNACIONAL DE JÓVENES ESPERANTISTAS - BADAJOZ 2018

Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo	Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo
Enkonduko al genro	Kion signifas 'genro' kaj kial oni distingas inter ĝi kaj sekso? Kaj kio okazas se ili malsamas? Venu al tiu ĉi enkonduka prelego por pli bone kompreni la fundamenton de la temo.	Mia	Esperantista valuto	Imagu se esperantistoj havus sian propran valuton! Ekaperis multaj ciferaĵoj kiel Bitmono, sed imagu se ekzistus mono por Esperantujo. Dum ĉi tiu prelego, mi proponos kaj diskutos kelkajn ideojn pri kiel kaj kial ni povus krei esperantistan valuton.	Robert
Esperanto-stacidomo, la nova internacia esperanto-centro ĉe Berlino	En eksa stacidomo tuj ekster Berlino ekestas nova Esperanto-domego kun renkontiĝejoj en belegaj historiaj domoj kaj kun dormeblecoj por ĉ. 150 homoj. Ĝi havas rektajn trajno-konektojn al la internacia flughaveno kaj la urbocentro de Berlino kaj estos nur minutoj for de internaciaj turismaj centroj kiel la naĝ-halego "Tropika Insulo". Eksciu pli kaj vidu la unuajn bildojn.	Raĉjo	Evoluo tra biologia kaj ĥemia lenso	Evoluo estas centra parto de biologio. Ĝi estas tiom forte ligitaj al la ĝi, ke oni vidas pruvojn de ĝi en ĉiuj kampoj de la fako. Ĉi tiu prelego esploras kelkajn kategoriojn de pruvoj de la teorio en biologio kaj la ĥemiajn meĥanismojn kiuj povas gvidi al evoluo. Espereble tiel la beleco de la komplekseco de naturo povas iĝi pli klara.	Frank
Fabeloj pri amo	Eterna enigmo, kerne homeca, kaŝiĝas en stranga fenomeno: antikvaj fabeloj de diversaj landoj kaj kulturoj, eĉ de tiuj, kiuj neniam interkomunikis, estas tre similaj, ofte eĉ samaj. Legante kaj aŭskultante ofte tristajn kaj terurajn, sed tamen plenajn de sincera kredo en vivon fabelojn, ni facile komprenas ilin sen ajna klarigo, kadre de alia, ofte fremda kulturo, ni facilanime kaj gaje vivas kun heroo kaj paŝas kun li laŭ la vojo, kiun nepre devas ĝisiri ajna homo, sendepende de tio, kia, kiam kaj kie li ekzistas. Ĉi foje temos pri vojo de amo.	Anna	Feminismo en Afrika literaturo		Prince Henry
Filma nokto	Vi ne havas kinejon kie spekti filmon en Esperanto en via urbo sed ni estas en Esperantujo. Prenu krevmaizon kaj spektu filmon kun ni!	Jozefo	Filozofio		Granda filozofo
Flugdisko	Venu kaj ludu tiun ekstere flugdiskon!	Tyron	Folklorajn dancojn		Jesa

74-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO - BADAJOZ 2018
74° CONGRESO INTERNACIONAL DE JÓVENES ESPERANTISTAS - BADAJOZ 2018

Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo	Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo
Fuŝaj intuicioj en probableco	Kial statistikisto portus bombon al aviadilo? Kompreneble, por senti sin pli sekure; estas ja multe malpli verŝajne ke pli ol unu bombo troviĝos en la sama aviadilo... La prelego mencias kaj ekzempligos la plej oftajn miskomprenojn pri probableco. Matematika antaŭscio nebezonatas.	Agata	Genra perforto	Malfacilas identigi ĉiujn specojn de perforto kaj sinsekve kontraŭbatali ĝin, ĉar foje ĝi kaŝiĝas sub senpekaj kaj ĝentilaj frazoj kaj faroj. Indas do en nia ĉiutaga vivo pli atenti pri "malvideblaj" perfortoj, kiuj tamen ne estas malpli gravaj ol tiuj videblaj kaj denunciindaj. Pere de interaga aktiveco, ni invitas vin observi kaj cerbumi pri antaŭjuĝojn kaj kondutojn, kiuj kapablas naski perforton.	Projekto FEJ
Gvidado en la urbo	Badajoz estas malnova urbo en kies stratoj oni povas tuŝi ĝian historion. Promenu strate kun ni dum sperta gvidisto rakontas al ni ĝiajn sekretojn. Busoj privataj veturigos nin de la kongresejo je la 9.45 kaj reen je la 12.15	Carlos	Homlupo	Unu el la plejluditaj ludoj en Esperantujo estas Homlupo. Atentu vilaĝanoj ĉar eble la nokto estos la kaŭzo de via ne vekigo!	Betti
IJK 2019	Venontjare la IJK okazos en Slovakio kaj sia teamo prezentos la plej mojosan eventon el la jaro. Atentu ĉar vi sentos la bezonon aliĝi eĉ antaŭ pretos la aliĝilon!	Léon	Interkona vespero	Ne timu ne koni aliajn aliĝintojn. Dum la interkona vespero per ludoj kaj aktivaĵoj vi ekkonos plurajn homojn kiujn tre eble iĝos viaj plejbonaj amikoj	Yasna
Internacia vespero	Ĉu vi ŝatas danci? Eble vi preferas kanti, ludi teatraĵon aŭ ridigi homojn per monologo. Ekdecidu ĉar vi mem realigos tiun ĉi programeron per via mallonga spektaklo.	Michael Boris	Jogumado kaj ekzercado	Kial ne komenci la tagon movante niajn pugnojn? Do ek! Ne pigru kaj aktiviĝu ekde la mateno!	Carlos
Junularo en UK 2017, Seulo	Young-Long raportos sian sperton kun gejunuloj en la lasta Universala Kongreso en Seulo. Sekvos diskuto pri kiel junuloj povos junigi la IMK - Internacia Maljunulara Kongreson.	Young-Long	Kapoejro	Batalarto disvolvita de afrikaj sklavoj alportitaj al Brazilo de iliaj posteuloj. Ĝin karakterizas lertaj kaj kompleksaj korpomovoj, farataj ofte sur la planko aŭ kapmalsupre kaj piedleve, kaj havantaj kelkfoje fortan akrobatan komponanton. Karakterizaĵo distinganta ĝin disde aliaj luktoj estas la fakto, ke ĝi estas akompanata de propra muziko. Ofta dubo estas, ĉu kapoejro estas danco aŭ lukto; kapoejro, en vero, estas kaj danco kaj lukto. Venu kaj memmalkovru ĝin!	TJM de Jesus
Karaokeo	Se vi ŝatas la karaokeon, vi bonŝancas ĉar ni okazigos tian eventon por la vespera programo. Ne gravas kiom bone vi kantas sed kiom multe vi amuziĝas.	Unika kaj Nepo	KER ekzameno	Kontrolu vian lingvan nivelon per la oficiala ekzameno de Esperanto. Aliĝu per tiu ĉi ligilo: https://edukado.net/alighilo?id=2018ES-BADA	Juan Diego

74-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO - BADAJOZ 2018
74° CONGRESO INTERNACIONAL DE JÓVENES ESPERANTISTAS - BADAJOZ 2018

Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo	Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo
Kial homoj neas sciencon?	Ni ŝajne vivas en mondo kie opinio estas pli grava ol vero. Estas tre malfacile akcepti la eltrovojn de la scienco. Kiun kialon donas la scienco? Kaj vi estos testita per kelkaj temoj pri kiu multaj homoj havas malfacilaĵojn.	Bart	Kian rolon ludas ACM en esperantujo?		Francois
Kiel pensi pli racie		Agata	Komitatkunsido	La komitato estas la supera organo de TEJO. Ĝi kunvenas almenaŭ unufoje jare dum la IJK. La sesioj estas malfermaj por ĉiuj kiuj volas aŭskulti la diskutojn. Venu se vi interesiĝas pri kiel nia organizo laboras por Esperantujo.	Charlotte
Komunan foton	Neniu IJK kompletas sen foto en kiu ni ĉiuj aperas. Endas partopreni. Tiel ni pruvos la devizon de TEJO "june kaj kune"	Carlos	Koncerto de Cira y Ulises	La loka grupo el du fratoj ludos kun bando hispane por ni. Ni profitos bonan kaj plurstilan muziko. Ni montru al la lokanoj kiom bone ni scipovas ĝui la vesperon	Carlos
Koncerto de Jonny M	Jonny M estas unu el la plej konataj artistoj en Esperantujo. Venu kaj dancu regeon kun ni!	Carlos	Koncerto de Martin Wiese	Ekde la 80aj jaroj Martin Wiese ludas Esperantan muzikon. Venu al la koncerto de Martin por kanti muziksukceson kiel Superbazaro!	Carlos
Koncerto de Timothy Gallego	Timothy kantas trankvilan popularan muzikon. Bonege por aŭskulti post aktiva tago!	Carlos	KulturLingva Festivalo	Dum tiu ĉi evento en publika strato ni kundividus la kunportitajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el niaj landoj por montri niajn tradiciojn kaj kulturojn. Ne forgesu viajn vestaĵojn kaj viajn dancojn! Busoj privataj veturigos nin de la kongresejo je la 19.15 kaj reen je la 22.15.	Carlos
Kunsido de KEJ	KEJ profitos de la IJK por antaŭenpuŝi nian movadon en Katalunio. Venu kaj helpu per viaj ideoj	Krishna	Kurso de Esperanto (komencantoj)	Ĉu vi volas eklernis aŭ nur iomete lernis nian lingvon? Profitu de la IJK por plibonigi ĝin teorie kaj praktike. Lernu la bazon kun Karina	Karina
Kurso de Esperanto (meznivelo)	Vi jam scipovas la lingvon sed ankoraŭ estas kelkaj eraroj kiujn vi faras? Ĉu estas kelkaj gramatikaĵoj kiujn vi ne komprenas? Sekvu la meznivela kurso de Esperanto por bone regi la lingvon post la fino de la IJK	Tim	Kurso de Esperanto (progresantoj)	Hanso BECKLIN gvidos perfektigan kurson por progresantoj: tiuj, kiuj jam sentas sin pli-malpli komfortaj en la lingvo kaj havas sufiĉe larĝan vortprovizon. Ni ne traktos la tiklajn temojn de Esperanto-gramatiko, kulturo, aŭ leksiko seke, sed nerekte: per noveloj, kantoj, poemoj, eseoj, kaj aliaj interesaj, kiuj povas naski ene de niaj mensoj aferojn diskutindajn kaj pripensindajn.	Hans

74-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO - BADAJOZ 2018
74° CONGRESO INTERNACIONAL DE JÓVENES ESPERANTISTAS - BADAJOZ 2018

Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo	Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo
Kurso de la Germana	La kutima esperantisto ŝategas lingvojn, tial ni oferas kurson de la germana por ke vi povos eliri la IJK-n kun plibona vivresumon ;)	Betti	Kurso de la Hispana	Eble la Hispana ne estas tiom facila kiel Esperanto sed estas la loka lingvo. Do, kial ne profiti de tiu ĉi por lerni ĝin? Venu al kurso por poste varbi surloke pri nia IJK, hehe.	Doan
Kurso de la Portugala	Badajoz estas tiom proksime al la landlimo ke ne sencis forgesi pri la Portugala lingvo. Oni povas multe lernis dum la IJK!	Daniel	Kurso de la Tetuna	La Tetuna estas la oficiala lingvo de Orienta Timoro. Malkovru ĝin kaj ĝian kulturon.	Bapa
Kvizo		Antonia	La evoluo de homaj rajtoj kaj genra egaleco en latinamerikaj konstitucioj	Tiuprelege, Querino celas kompari la evoluon de homaj rajtoj rilataj al la genro danke al la strebo de virinoj (li celas montri la konkeron de la balotrajto) kaj GLAT-aj homoj, sed pli specife la transgenraj (li montras la bazon de la leĝoj pri homoniĝo kaj la uzo de nomoj/necesejoj por ili). Interalie, li komparas ankaŭ la politikan situacion kaj kiel tio influas la rajtkonkeron	Querino
La senforĵetaĵema movado	Kiu amas poluecon? Certege neniu! kaj tiuj uloj volas forigi poluecon de nia tagvivo, Lasu min komprenigi al vi ĉion pri ĝi	Taled	Litololaĵa ateliero	Venu trovi tiun artiston kiu kaŝas ene de vi kaj kontribui al nia komuna laboro sur litololaĵo kun viaj belaj pentraĵoj.	Eugénia
Logiko		Granda filozofo	Ludu Go	Kiel la proverbo diris: "Kelkaj momentoj por lerni, vivdaŭro por majstri". Lernu la regulojn de la azia tabul-ludo Go en 5 minutojn. Poste ni ludos kaj klarigos viajn dubojn do vi povas ludi dum la kongreso aŭ enreta	Alejandro
Malgraŭ ĉio, ŝi persistas en verkado: virinaj aŭtoroj en nia literaturo	Hanso BECKLIN prelegos pri kvar gravaj virinaj aŭtoroj, kiujn li opinias foje forgesataj kaj ofte ne sufiĉe laŭdataj pro la insida influo de seksismo ene de niaj beletraj rondoj: Marjorie BOULTON, HASEGAWA Teru (Verda Majo), Spomenka ŠTIMEC, kaj Eli URBANOVA. Li volas prezenti iliajn kontribuojn al nia originala literaturo kaj preparoli la gravecon de seksa egaleco por literaturo en Esperanto ĝenerale.	Hans	Maorioj	Nov-Zelando: La lando de blankaj ŝafoj, nigra sablo, kaj verdaj arbaroj. Sed antaŭ ol ĝi iĝis tiel multkultura kaj relative mondfama, ĝi estis la lando de la maorioj. Ni esploru la kulturon kaj lingvon de la famaj praloĝantoj de Nov-Zelando.	Marie
Mezepokaj dancoj	Dum la kurso vi konatiĝos kun diversaj rondodancoj, vi sentos etoson de popoldancoj ktp.	Elena	Muzika lingva kvizo		Matthieu
Muzikfilmadeo	Kunkreinto de la fama muzikvideo Dek Bovinoj, Pablo Busto, celas registri novan dum la IJK. Nia helpo estas bezonata. Venu kaj dancu kun ni por nia muzikkulturo!	Pablo	NP: La unua renkontiĝo	NP=Novula programo. En tiu ĉi unua renkontiĝo, la novuloj ekkonatiĝos kaj lernos pri la taskoj kiujn ni preparis por ili. Se vi estas novulo, endas ke vi partoprenos.	Yasna

74-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO - BADAJOZ 2018
74° CONGRESO INTERNACIONAL DE JÓVENES ESPERANTISTAS - BADAJOZ 2018

Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo	Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo
NP: Solvu viajn dubojn	La dua programero de la novula programo. La celo estas solvi dubojn pri kutimoj kaj kulturaĵoj de Esperantujo. Kiel la homoj dancas la Bambon? Ĉu ĝi estas la plej mojosa evento el la jaro? Ĉu la denaskuloj venas el la IJK? ktp	Kévin	NP: Vian sperton en la IJK	La lasta programero por la novuloj. Venu kaj rakontu kiel tiun ĉi semajno ŝanĝis vian vivon kaj komparu vian sperton kun la de aliaj novuloj.	Álvaro
Podia diskuto de kern.punkto pri la kongresa temo	Registrado de programo pri feminismo de la podkasto kern punkto	Johannes, Eva kaj Julia	Poezio		Veliga
Politika debato	Ni invitis politikajn partiojn por ke ili debatu pri siaj opinioj rilate al genra egaleco. Venu por aŭskulti kaj restu por subteni nian bonvenon al neesperantistoj en nia evento	Carlos	Projektoj de E@I		Matthieu
Renkontiĝo de aŭskultantoj de kern.punkto	Venu por interkonatiĝi kaj babili kun la teamo de kern.punkto	Johannes kaj Eva	Ridojogo		Betti
Rifuĝintoj en Eŭropo kaj la mortolisto	Dum ĉi-tiu prelego mi priparolos la fenomenon de enmigrado al Eŭropo dum la lastaj jaroj (ofte nomata "krizo de rifuĝintoj"), el la vidpunkto de iu, kiu laboris pri la datumbazo de mortoj de rifuĝintoj de UNITED. De kie rifuĝintoj venas, kaj kial? Tra kiuj vojoj ili venas, kaj kiujn danĝerojn ili renkontas survoje? Kio okazas al ili, post ke ili sukcesis eniri Eŭropon? Kiuj decidoj de EU endanĝerigas ilin? Jen la ĉefaj demandoj traktotaj. Je la fino bonvenas demandoj, diskutado kaj interŝanĝo de scioj kaj opinioj.	Klára	Ŝakoj	Pensu kaj ludu ŝakon. Amuziĝu per tiu ĉi tabloludo dum via menso estas defiita.	Veliga
Scienca komunikado		Orlando	Scienca mir-kvizo	Bonvulo kunporti aparaton kun retumilo por interrete kunludi. Kvizo kie la celo ne estas venki (ni eĉ ne kalkulas la personajn poentojn, ĉiu faru por si) sed miri (kaj lerni) pri scienco. La demandoj venas el sciencaj revuoj.	Bart
Skotaj dancoj	Kundancado de kelkaj facilaj tradiciaj skotaj dancoj: se vi scias nombri ĝis 8 vi povas danci kun ni	Christine	Solena malfermo	Publika programero en kiu la organizantoj prezentos la IJK kaj reprezentantoj de instancoj politikaj salutos nin	Carlos

74-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO - BADAJOZ 2018
74° CONGRESO INTERNACIONAL DE JÓVENES ESPERANTISTAS - BADAJOZ 2018

Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo	Aktivaĵo	Priskribo	Respondeculo
Trejnado pri egaleco	Danke al subvencio de la Eŭropa Unio, ni ofertas trejnado pri egaleco dum la IJK 2018. La malfermitaj partoj de la trejnado aperas kun aliaj nomoj.	Projekto FEJ	Unuiĝintaj Nacioj: Agado kaj modela UN	Rakoen prezentas sian agadon ĉe UN de TEJO kaj faras proponojn por novaj projektoj. Li estas Komisiito pri Unesko kaj volontula delegito ĉe UN en la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO. Venu se vi interesiĝas pri serioza altnivela agado, aŭ rakontoj pri diplomatikaj aventuroj!	Rakoen
Utopio	Klaŭna spektaklo preparita el María Simões por ke ni pensu pri la estonteco kiun ni konstruas, por ke ni komprenu ke oni devas havis malfacilajn celojn kiuj gvidos nian agadon.	Maria	Vikipedio	La esperanta versio de la kunlabora enciklopedio estas tre granda rilate al la kvanto de esperantistoj. Tio okazas pro tendenco inter esperantistoj kunlabori kaj kunhelpi. Partoprenu en tiu ĉi aktivaĵo por prilerni kaj daŭrigi tiun ĉi agadon.	Kani